

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum kelkaj monatoj ni turnos nian atenton al la vivo, penso kaj verkaro de Hector Hodler, unu el niaj valoraj verkistoj.

A.- Dum la du pasintaj semajnoj ni legis al vi tekstojn de Hector Hodler, kiuj aperis en la gazeto *Esperanto* je la 12-a de julio 1907 por festi la dudekan jubileon de esperanto. Temis pri longa poemo titolita **Festa kanto** kaj pri front-artikolo titolita **Jubileo de Esperanto**.

Cl.- En tiu sama numero de la gazeto **Esperanto** troviĝas tria artikolo de Hector Hodler. Kiel multaj artikoloj de la juna redaktoro, ĝi estas subskribita per la literoj **A. R.** Ĝia titolo estas **Historio de Esperanto**. Ni pensas vin interesi legante la unuan parton de tiu studo. Vi konstatos, ĝin aŭdante, ke la dudekjaraĝa Hector Hodler estis bonege dokumentita, ke li en kelkaj linioj estis kapabla ekzakte situigi la ĉefajn eventojn, kiuj markis la rapidan disvolviĝon de la lingvo internacia proponita de Zamenhof. Jen ni legas al vi tiun tekston de Hector Hodler :

A.- « *La detalojn pri la antaŭpublika historio de Esperanto, tio estas de la naskiĝo de la ideo pri internacia lingvo ĉe D-ro Zamenhof, ĝis la momento, kiam li, post longa laborado, publike eliris kun ĝi, oni trovos en la mirinda **Letero pri la deveno de Esperanto**, kiun posedis kaj tralegi devas ĉiu vera Esperantisto.*

Cl.- *Per la jenaj linioj, daŭrigas Hector Hodler, ni celas nur tre mallonge raporti pri la ĝisnuna historio de Esperanto.*

A.- *La unua broŝuro de D-ro Zamenhof aperis en 1887, la rusa cenzuro permesis ĝian aperon la 21-an de Julio 1887.*

Cl.- *En la momento kiam eliris la **Lingvo Internacia de D-ro Esperanto**, oni en la mondo parolis pri Volapük, kiu en la tiama tempo elvokadis grandan famon, sed post la jaro 1889, pro diversaj kaŭzoj, rapidege malsukcesis.*

A.- *Tuj de la naskiĝo de Esperanto, kelkaj Volapükistoj, frapitaj de la evidenta plibono de la lingvo, transiris al ĝi kaj sindone laboris por ĝia disvastiĝado.*

Cl.- *Inter ili, la plej fama estas S-ro Einstein, kiu konvertis la Volapükistan klubon en Nürnberg kaj publikigis studojn kaj lernolibrojn pri la demando.*

A.- *Einstein estas unu el la unuaj batalintoj por Esperanto kaj al li la Esperantistaro ĉiam havis grandan dankemon.*

Cl.- *Bedaŭrinde, Einstein baldaŭ mortis, kaj kun li ankaŭ pereis la movado, kiun li instigis en Germanujo.*

A.- *Tamen, en Rusujo, la lingvo senbrue disvastiĝis, havante kiel solan rekomendon sian mirindan simplecon kaj logikecon.*

Cl.- *La unua **Adresaro** enhavas ĉefe Rusajn nomojn : ni tame rimarkas en ĝi Francojn, inter kiuj S-ro de Beaufront.*

A.- *La 1-an de Septembro 1889 aperas la unua Esperante redaktita ĵurnalo, nome LA ESPERANTISTO, dank'al la subteno de Einstein.*

Cl.- *Intertempe adeptoj publikigis tre modestajn lernolibrojn ; samtempe aperas la unuaj verkoj de nia Esperanta literaturo : **Hamleto**, de D-ro Zamenhof ; **Iliado**, **Kaino** kaj la*

Edziĝo de Figaro, de A. Kofman ; *Boris Godunov*, de Devjatnin, *Princino Mary*, de E. de Wahl ; *la Liro de la Esperantistoj*, de A. Grabowski, kaj tiel plu.

A.- Tiuj verkoj, nun klasikaj, vivigis la lingvon kaj ĝin riĉigis ; ankaŭ aperis originalaj, versaj aŭ prozaj verkoj ; ĉiuj Esperantistoj konas la belajn poeziojn, kiujn D-ro Zamenhof tiam verkis por vigligi la fervoron de siaj adeptoj.

Cl.- *La propagando de Esperanto estis tre malfacila.*

A.- *La Esperantisto* povis vivi nur dank'al la financa kunhelpo de Trompeter, al kiu oni ankaŭ ŝuldas la eldonon de la unua franca lernolibro (1892).

Cl.- *Post la unuaj lernolibroj, la aŭtoro de la lingvo eldonis la **Duan Libron** sekvitan de Aldono al la Dua Libro en kiuj li klarigas siajn ideojn pri la estonta evoluado kaj disvolviĝado de la lingvo.*

A.- *En tiu tempo, la Amerika Filozofia Societo intencis organizi kongreson por esplori la demandon pri helplingvo. La dirita societo estis favora al Esperanto kaj D-ro Zamenhof anoncis, ke li fordonas la sorton de la lingvo al tiu kongreso ; li konsilis, ke, se la Amerika kongreso ne okazos, la Esperantistoj mem fondu akademion aŭ ligan.*

Cl.- *La kongreso, pro nesufiĉeco de interesatoj pri la demando, ne okazis kaj, post la insistaj petoj de multaj Esperantistoj, D-ro Zamenhof informis, ke li proponas tian Ligon.*

A.- *La Ligo fondiĝis, sed, pro ne bona organizado, ĝi liveris nenian ŝatindan rezultaton pri la propagando kaj, kontraŭe, elvokis bedaŭrindajn interdisputojn, koncernante la demandojn pri reformoj.*

Cl.- *Post tia malfeliĉa provo, D-ro Zamenhof haltigis la aferon kaj la unua Ligo mortis apenaŭ post naskiĝo.*

A.- *Sed la disputoj pri reformoj ne ĉesis, ĉar, laŭ D-ro Zamenhof, la lingvo devis resti en provado dum kvin jaroj.*

Cl.- *Post tiu templimo, li decidis ekprovi fondon de Ligo sur alia fundamento.*

A.- *Tiu Ligo konsistis simple el la abonintoj al la centra gazeto **Esperantisto** ; ĝia ĉefa celo estis la reformado de la lingvo kaj ĝia propagando.*

Cl.- *Kelkaj fervoraj Esperantistoj tiam batalis kontraŭ la Ligo kaj ĝia reformemo, nome S-ro de Beaufront.*

A.- *Por fini tiajn disputojn, D-ro Zamenhof proponis, ke la Esperantistaro (tio estas la abonantoj de la gazeto) voĉdonu definitive pri tio.*

Cl.- *Per 157 voĉoj kontraŭ 107 (dividitaj en tri malsamaj partioj), ĝi decidis, ke « oni devas restigi sensanĝe la ĝistiaman formon de la lingvo. » (Novembro 1894).*

A.- *La disputado estis finita : nun oni povis pensi pri propagando kaj pozitiva laboro. »*

Cl.- *Hector Hodler poste raportas pri la malpermeso de la rusa cenzuro, kiu malaperigis la gazeton *La Esperantisto*, pri la naskiĝo de la gazeto *Lingvo Internacia* kaj pri la iom-post-ioma disvastiĝo de esperanto en Francion kaj poste en aliajn landojn.*

A.- *En tiu historia skizo la eventoj okupas normalan lokon. Tio pruvas, ke Hector Hodler havis klaran komprenon pri la evoluprocedo kaj pri la disvolviĝo de esperanto.*

Hector Hodler, 10-a parto : *Historio de esperanto*
Claude Gacond, 353-a radioprelego, 1970.07.15 & 18

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis
reaŭdo !

-oOo-